

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Ahmad Reza Mamduhi

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Enrico Gaetano Borrello

Eva-P. Boyadzhieva

Laura Brazzabeni

Maximiliano Garcia

Krystyna Grochocka

Mireille Grosjean

Marija Jerković

Alessandra Madella

Ahmad Reza Mamduhi

Radojica Petrović

Fernando Pita

Alessandro Simonini

Trezero Huang Yinbao



## ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) .....	3
Ahmad Reza MAMDUHI: <i>VEKI-2, la 54-a ILEI-Kongreso</i> .....	4
Ahmad Reza MAMDUHI: <i>Okaze de VEKI-2, la 54-a ILEI-Kongreso</i> .....	5
Sinprezento de la novaj estraranoj.....	9
Mireille GROSJEAN: <i>Bilanco de ok jaroj en la prezida ofico 2013-2021</i> ...	12
Radojica PETROVIĆ: <i>Esperanto en universitataj medioj [...]</i> .....	16
<i>Kungfua Kuniklito sin prezentas [...]</i> (A. MADELLA, M. GARCIA).....	18
<i>La Nacia E-Biblioteko kaj Arkivo de Massa</i> (E.BORRELLO, A.SIMONINI)	22
Mireille GROSJEAN: <i>Ne okazas lernado sen fido</i> .....	26
El la landoj kaj sekcioj (BG) .....	29
Krystyna GROCHOCKA: <i>Esperanto-Sumoo en lingvolernado</i> .....	30
Trezoro Huang Yinbao: <i>Akra disputo pri la angla [...]</i> .....	31
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj .....	37

## ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <mamduhi@gmail.com>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.
- Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <lena\_espero@mail.ru>. Lerneja agado.
- Estrarano pri financoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. ilei.kasisto@gmail.com (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <karinko\_arm@mail.ru>. Ekzamenoj.
- Vic-prezidanto:** Alessandra MADELLA, via Prampolini 8 43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <a.madella@tiscali.it>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.
- Estrarano pri kongresoj:** Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, 58031 Arcidosso (GR), Italio. <laura.brazzabeni@gmail.com>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.
- Estrarano:** Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, 10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <mjerkovic@net.hr>. Lerneja kaj landa agadoj.
- Estrarano:** Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Janeiro cep 21220-310, Brazilo. <magisterpita@gmail.com>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapbligado.

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin,**

Usono, University of Hartford;

AdE<sup>1</sup>

**Membroj:**

**Duncan Charters,** Usono, Principia College, Elsah

**Renato Corsetti,** Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta,** Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius,** Litovio, Šiaulių universitetas

**Boris Kolker,** Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iona Koutny,** Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/ Hungario

**Aleksandr Melnikov,** Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE<sup>1</sup>

**Radojica Petrović,** Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha,** Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

---

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

**Sur la titolpaĝo:** Maximiliano Garcia, produktanto de *Kungfua Kuniklito* (vd. p. 18)

**Sur la dorskovrilo:** Miguel Herberg kaj Ningna, teamanoj de *Kungfua Kuniklito* ĉe la Foiro de Infana Libro en Bologna, Italio (vd. p. 18)

## **Enkonduko**

Karaj legantoj,

mi elkore esperas, ke ankaŭ dum la nova ofic-periodo 2021-2023 de ILEI-estraro, multo utila okazos tra la mondo danke al ILEI kaj ĝia kunlaborado kun aliaj E-aj kaj neEsperantaj organizaĵoj. Kompreneble, ideale la E-aj organizaĵoj harmoniiĝu unu kun la alia por aliri neEsperantajn organizaĵojn, ĉu registarajn ĉu neregistarajn, por konvinki ilin pri la graveco de kaj bezono je nia lingvo, precipe en la hodiaŭa mondo, kiu barakte batalas kontraŭ la varmiĝo de la Tero unuflanke, kaj kontraŭ la reganta pandemio aliflanke. Ambaŭ ili, kiel multaj aliaj grand-problemoj de la nuna homaro, neniel (re)konante la geografiajn limojn, postulas tute internaciajn kunlaboradojn, kiuj premise necesigas fluan kaj fruan interkomprenadon lingve: ion, kion ja nia lingvo plej bone povas ebligi plej malmultkoste kaj kun plej eta energio aŭ homforto.

La virtualeco de niaj lastaj du Kongresoj (VEKI-1 kaj VEKI-2), pli kaj pli vastigis la spektron de la landoj kaj homoj, kiuj partoprenas en niaj kunvenoj: nun en la malĉeestaj kunsidoj estas videblaj landoj kaj homoj, kiuj neniam antaŭe partoprenis en niaj ĉeestaj Kongresoj. Do, kvankam la nuna virusa kondiĉaro draste disigis nin fizike, eĉ ene de niaj urboj, kvartaloj kaj vilaĝoj, samtempe ĝi virtuale proksimigis nin el tute foraj distancoj, eĉ transkontinentaj, por espereble pli da fruktodonaj intelektaj kaj interkulturaj komunikadoj.

*Ahmad Reza MAMDUHI*

## VEKI-2, la 54-a ILEI-Kongreso, 7-14 aŭgusto 2021

### *Kongresa temo: Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj*

**Al la 2-a Virtuala Kongreso de ILEI aliĝis 156 personoj el 42 landoj**

*de Ahmad Reza MAMDUHI (Irano)*

Kadre de ĉi-jara VEKI okazis ankaŭ kaj AMO-76 en la 9-a kaj la 11-a de aŭgusto, kaj ILEI-Simpozio dum la 12-a kaj la 13-a de aŭgusto. En la unua tago de la AMO-Seminario okazis 6 prelegoj kaj la fina diskutado (bv.vidi EKO 2021-33), kaj en ĝia dua tago ok prelegoj kun la konkluda diskuto (bv. vidi EKO 2021-34). Pri la Simpozio vd. la artikolon sur p. 16.

Post la Malfermo de VEKI-2, sabate la 7-an de agusto, okazis du enkondukaj prelegoj fare de la UEA-prezidanto, prof. Duncan Charters (Kiajn celojn havu instruado de kulturo?) kaj prof. Ilona Koutny (Trarigardo de la E-a kulturo kaj ĝia apero en instruado), sekvate de interesa debato pri ili du.

En la sama tago la Elekta Komisiono, reprezentate de Aurora Bute, raportis pri tio, kion ĝi faris, kaj petis la kandidatojn sinprezenti mallonge. En tiu ĉi elektado ekzistis 8 kandidatoj: ĉiuj el ili estis elektitaj en la 2-a Kunsido de la ILEI-Komitato dum la Kongreso, en la 10-a de aŭgusto.

Kadre de la Kongreso okazis tri „Grandaj Debatoj”, kiuj estis gvidataj de la ILEI-prezidanto, Mireille Grosjean, vekante grandan intereson kaj diskutadojn:

1. „ILEI meze de la Esperanto-Movado” kun partoprenantoj el 9 landoj: Aurora Bute (Rumanio), Adjévi Adjé (Togolando), Jérémie Sabiyumva (Burundo), Zsófia Kóródy (Germanio), Duncan Charters (Usono), Ahmad Reza Mamduhi (Irano), Renato Corsetti (Britio) kaj Huang Yinbao „Trezoro” (Ĉinio).
2. „Tago de indiĝenaj popoloj kaj lingvoj” kun Will Norton (Usono), Mark Fettes (Kanado), Renato Corsetti (Internacia observanto), Adjévi Adjé (Togolando) kaj Giridhar Rao (Barato).
3. „Kiel efike instrui Esperanton en Afriko” kun Gilbert Ndiokubwayo (Burundo) kaj Adjévi Adjé (Togolando).

Krom la Malferm-tagaj prelegoj kaj la Grandaj debatoj, dum la Kongreso okazis 4 aliaj prelegoj fare de Ermanno Tarracchini (La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj sen psikiatrio), Aldo Grassini (Muzeo por tuŝi: Arto „videbla” ankaŭ por blinduloj), Larysa Osadchuk (Origamio - simpla kaj efika ilo por allogi homojn al Esperanto), kaj Mireille Grosjean (Kiel allogi homojn al Esperanto: la pirona kvizo).

La 9-an de aŭgusto okazis i.a. libro-prezentado fare de Bruĉjo Casini. En la sama tago eblis ankaŭ spekti du allogajn kaj edukajn filmojn, Maximiliano Garcia: „Savu la planedon kun Kungfua Kuniklito”, kaj Alessandra Madella: „La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo”.

Krome, la kongresanoj povis ĝui plurajn koncertojn fare de Mézes Gyöngyi, Kajto, Tarcisio Lima, Ĵomart kaj Nataŝa, kaj Amira Chun kun „Amuze”, la korea koruso; kaj unu atelieron fare de Larysa Osadchuk „Ludmetodoj en origamio por lerni Esperanton: origamiaj fabeloj, moveblaj modeloj, pupteatraĵo”.

La Nacia Vespero apartenis al Benino, kie povus okazi la Kongreso ĉeeste: Koncerto, kiun arte muntis Aristóphio Alves Filho kun Afrika muziko fare de Zhou-Mack Mafuila, Mayoma kun JoMo, Konga espero, Koruso Prisma kaj Vigla Muziko (Dido Fundu)

La teknika flanko de VEKI-2, kiu okazis en Zoom, estis brile prizorgata de la firmao Civiencia kaj Unika.

## Okaze de VEKI-2, la 54-a ILEI-Kongreso

*de Ahmad Reza MAMDUHI (Irano)*

### **Enkonduko: Internaj kaj interaj agadoj de ILEI**

Se temas pri grandskalaj organizaĵoj kiel UEA kaj ILEI, ĉiam ekzistas tiel reganta emego aŭ devigo por tro okupiĝi pri la internaj agadoj, t.e. disponigi diversajn servojn al siaj membroj. Tio ofte ne restigas (multajn/sufiĉajn) tempon kaj energion por interaj agadoj, nome fruktodonaj rilatoj inter ili kaj aliaj organizaĵoj, ĉu ene de Esperantujo, ĉu – kaj precipe – ekster ĝi. Tiaj organizaĵoj ja bezonas trovi vojojn por kaj daŭrigi – kaj eĉ plibonigi – siajn servojn al la jama membraro, kaj kapabliĝi ekagi kaj okupiĝi pri novaj projektoj kaj elpaŝoj speciale rilate al la neesperantistaj organizaĵoj kaj individuoj. Tio probable povas esti ebla i.a. per ekaplikado de volontulaj helpoj, kaj/aŭ per komisiado de specifaj taskoj al enaj aŭ elaj homfortoj ĉu esperantistaj, ĉu ne.

### **Porpacaj kaj pormediaj NRO-oj: taŭgaj celoj!**

Ĉi-rilate, eble unu el la plej taŭgaj celgrupoj povas esti NROj (Ne-Registaraj Organizaĵoj), precipe tiuj, kies ĉefa celo estas tutmonda paco kaj mediprotektado – la plej bezonataj aferoj nuna-monde.

Imagu kio okazos se ni aliru ekz-e al GreenPeace (Verda Paco), kiu probable estas la plej vasta NRO por la protektado de la Tero, cele al

- Prezenti kaj instru(ig)i E-on al ili kaj/aŭ iliaj membroj kaj/aŭ iliaj celgrupoj
- Trejni/eduki E-instruistojn por ili
- Elpensi frap-frazojn/memeojn por ili, kiel: „Esperanto: la konektanta lingvo por kunsavi la Teron!”

Komprenoble tiajn elpaŝojn tute subtenas la ĉefaj celoj de ILEI laŭ ĝia Statuto:

„3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.

3.2 Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.”

### **Kial ni ne tut-elŝeliĝu?!**

Dum kokido ne elvenas el la ovo transpasante sian ŝelon, certe neniu en la mondo vidas ĝin kiel vivantan estaĵon. Verŝajne ankaŭ ni kaj nia lingvo nun devas tute eloviĝi (el-Esperantujiĝi) por elmontri nin kaj nian lingvon al la ekstera publiko kaj mondo.

Iam, eventuale dum la unuaj jarkvindekoj de nia movado, eble ni ne estis tute maturiĝintaj aŭ fortiĝintaj ĉiuaspekte, kaj sekve ni ne kuraĝis aŭdace kaj/aŭ ade elprezenti nin kaj nian lingvon al la ekstera publiko, simple ĉar: nia lingvo, literaturo, kulturo kaj nombro ankoraŭ ne sufiĉe kreskintis por kuraĝigi nin por fari tio. Certe, tiam kaj tiam (ekz-e 1921 en la Ligo de Nacioj) ni kontraŭbekis nian ŝelon eligante parton de nia kapo tamen ne vidante konvenajn kondiĉojn aŭ sentante grandajn minacojn ekz-e deflanke de ŝovinistoj, ni reiris en la ŝelon. Sed nun, kial ni ne tut-elŝeliĝu? Nun, kiam ekz-e la nura – kaj ege valora – verko de Geoffrey Sutton, „Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto” (2008, 728 pp.) bone sufiĉas por mutigi ĉiun, kiu volus kontraŭparoli la esprimivan forton de nia lingvo, aŭ la nura Esperanta versio de la Vikipedio – kiu preskaŭ rangas en la unua dekono de 300 lingvoj, kiuj fakte havas sialingvan version de la Vikipedio – pli ol sufiĉas por montri la aktualecon de nia lingvo, kaj multajn multajn aliajn ekzemplojn divers-terene. Vere, kial nun ni ne eliru el nia ŝelo, nome el nia amata Esperantujo, ekstera-publikon por tutfiere kaj memfide prezenti nian problem-solvan, ŝparigan kaj fakte eliksiran Esperanton?

### **Esperanto por vivogravaj funkcioj: Prezenti nian juvelon al homoj en bezono**

Eble unu el la kialoj, pro kiuj ni ne tiom prosperis en universaligado de nia lingvo, kiom ni dezirus aŭ antaŭvidus, estas tio, ke ni ne komencis de tie,

kie la rolo de la lingvo estas vivograva kaj forte bezonata! Probable nia komencado per „luksaj” aplikadoj aŭ terenoj, kiel literaturo, beletro kaj ĝenerale belartoj, ne estis la plej taŭga vojo al nia celo – kvankam por pruvi la lingvajn kapablojn de Esperanto tio ja utilis pleje!

Tamen, imagu, ke nun ni ekprezentu kaj ekinstru(ig)u nian lingvon kiel „La lingvo de lingvaj minoritatoj, kiel indiĝenoj, enmigrintoj, rifuĝintoj k.s.!”. Ni scias, ke en multegaj landoj de la hodiaŭa mondo troviĝas en grandaj skaloj tiaj civitanoj, kiaj ne scipovas (bone) la tiea(j)n oficiala(j)n lingvo(j)n. Jam delonge tro multaj rimedoj estas konsumataj – ĉu mone kaj tempe, ĉu homforte – por aŭ lernigi al ili la loka(j)an lingvo(j)n, aŭ por intertradi/interpreti de kaj al iliaj lingvoj – iam tre multnombraj. Eĉ malgraŭ tiom da tro-elspezoj, ankoraŭ multas okazoj, kie mankanta aŭ nebona interkompreno kaŭzas katastrofojn en plej diversaj landoj de la mondo.

Certe se ni prezentos nian solvantan juvelon, Esperanton, kaj al tiaj ŝtatoj/registaroj kaj al tiaj minoritatoj, ili pli ol ĝojos ekapliki ĝin por siaj reciprokaj komunikadoj. Ĉar tiel, eĉ se ili kalkulus ege ĝenerale kaj nur per fingre, ili konstatos, kiom nia solvo ŝparigos al ili monajn, tempajn kaj homfortajn rimedojn unuflanke, kaj aliflanke kiom pli fidindiĝos la komunikado mem inter ili – kaj ekz-e inter diverslingvaj kuracistoj kaj malsanuloj. En la 1990-aj jaroj, la karmemora Kent Jones (1926-2004), usona esperantisto, faris ion similan pri la internacia aviado, montrante, kiom multaj aer-akcidentoj kaj -katastrofoj okazis nur sekve de lingvaj miskomprenoj inter respondeculoj en la kontrol-turoj de flughavenoj kaj diverslandaj pilotoj, kiuj ne scipovis ĝuste la prononcmanon de la angla – lingvo kun nur 26 literoj por reprezenti ĉ. 60 diversajn sonojn!

*„Certe kontribuis al lia firma engaĝiĝo en la batalo por internacia aviada lingvo la fakto ke, la 20an de decembro 1995, la flugo 965 de American Airlines, aviadilo Boeing 757, de Miami al Kolombio, koliziis kun monto apud Cali, Kolombio. La pilotoj nur malfacile kaj malbone komprenis la ordonojn de la kolombiaj registoj de aertrafiko. Inter la 159 mortintoj troviĝis la kunulo de filino de Kent Jones”<sup>1</sup>.*

### **Virtuala mondo postulas paradigman-ŝanĝojn kaj novajn paradigmojn**

Ekde la virtualiĝo de Esp-kongresoj – eĉ la naciaj – en iuj kazoj, kiel tiu de Irano, la proporcio inter la nombro aŭ elcento de la enlandaj partoprenantoj relative al la eksterlandaj tute renversiĝis! T.e., kiam la iranaj

---

<sup>1</sup> [https://eo.wikipedia.org/wiki/Roger\\_Kent\\_Jones](https://eo.wikipedia.org/wiki/Roger_Kent_Jones)

Esp-kongresoj okazis ĉeeste, averaĝe ĉ. 10 elcentoj de la partoprenantoj estis eksterlandaj, dum sekve de ilia virtualiĝo ekde 2020, eble averaĝe nur 10 elcentoj estis iranaj!

Se similan komparadon ni farus pri internaciaj kongresoj de Esp. antaŭ kaj post ilia virtualiĝo, probable ni trovus, ke:

- 1- La nombro de la partoprenantaj landoj kreskis.
- 2- La nombro de partoprenantoj el certaj landoj, kiuj antaŭe sendis malmultajn partoprenantojn al la Esp-kongresoj, abrupte plimultiĝis.
- 3- Sed bedaŭrinde samtempe, la nombro de la kongres-partoprenantoj el certaj landoj aŭ ne kreskis (tiel), aŭ fakte malkreskis!

### **Ŝtopi fendojn**

Certe la kaŭzo malantaŭ tia malkresko estas persista ekzisto de diversspecaj fendoj, iuj el kiuj povus almenaŭ iome ŝtopiĝi, se ni atentu ilin kaj trovu rimedojn por forigi aŭ mallarĝigi ilin. Ĉi tie ni nur traktu la ciferecan kaj ekonomian fendojn kiel ekzemplojn.

### **Kiel ŝtopi/mallarĝigi ciferecan fendon**

(Mal)feliĉe, ĉiuj tri supre menciitaj bonaj kaj malbonaj postsekvaĵoj de la virtualiĝo de niaj kongresoj okazis (mal)danke al la interreto: t.e. bona alireblo al ĝi, aŭ malbona aŭ manka alireblo al ĝi!

Por ŝtopi tian ciferecan fendon, atendante la delongajn promesojn de iuj landoj kaj kompanioj por „baldaŭ” disponigi „tutteran (satelitan) kaj senpagan interreton”, ni devas mem agi ĉi-celen probable per specialaj fondusoj – kiam nur la pagivo de homoj estas la problemo. Kvankam tiaj landoj kaj kompanioj havas siajn apartajn politikajn kaj/aŭ komercajn motivojn kaj celojn, tamen tio – kiam efektiviginta – abrupte spronos ankaŭ niajn divers-specajn agadojn kaj projektojn!

### **Kiel ŝtopi/mallarĝigi ekonomiajn fendojn**

Ideale ĉiuj niaj servoj, eĉ membriĝoj, kongres-aliĝoj, (almenaŭ ciferecaj versioj de) niaj revuoj, k.s. estu senpagaj por tiuj, kiuj ial ajn ne povas (facile) pagi por ili. Tamen ni ĉiam povas paralele anonci al ĉiuj, ke tiuj, kiuj volas subteni tian sistemon kaj subtenadon, pagu al nia kaso kiom ajn ili deziras/povas.

Bona novaĵo ĉi-terene estas tio, ke probable iam en proksima futuro, realiĝos (en pli granda skalo) „La (Universala) Baza Enspezo”, kio multege pli faciligos ĉies vivtenadon kaj i.a. tian sistemon! La Baza Enspezo estas propono starigita de pluraj ekonomikistoj, kiu resume konsistas el: La pago



de egala elspezo fare de la ŝtato al ĉiu plenrajta membro de la socio aŭ loĝanto, sendepende de tio kiuj estas iliaj ceteraj eblaj enspez-fontoj. Alidifine, laŭ Jordi Arcarons, profesoro pri Aplikata Ekonomio en la Fakultato de Ekonomio de la Universitato de Barcelono:

*„... kun malpli da vortoj: Baza Enspezo estas enspezo pagata de la ŝtato al ĉiu homo pro la sola fakto, ke tiu estas homo.”<sup>2</sup>*

### **Justa kaj interkultura komunikado kaj edukado**

Pere de tiuj ĉi paŝoj kaj multaj multaj aliaj, espereble ni kontribuos al la efektivigo de la „tutmonda justa kaj interkultura komunikado kaj edukado”. Feliĉe jam okazis la unua eksperimenta IKIKO (Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado) en decembro 2020, kaj ĝia posta kaj pli grandskala okazos en la ĉi-jara decembro (<https://ikiko.civencia.io/>).

## **Sinprezento de la novaj estraranoj**

### **Laura BRAZZABENI**

Mi devenas el Italio, estas instruistino pri fremdaj lingvoj kaj pri Esperanto. Mi doktoriĝis en fremdaj lingvoj per eseo pri instruado de fremdaj lingvoj kaj literaturo kaj poste en italaj beletroj. Mi oficiale rajtas instrui la anglan, la germanan, la hispanan kaj Esperanton kaj mi bone regas ankaŭ la francan. Mi estas vicprezidantino de Itala Esperanto-Federacio kaj Ĝenerala Direktoro de Itala Instituto de Esperanto. Mi instruas Esperanton ekde 1990 kun kursoj ankaŭ en lernejoj. Mi nun instruas ankaŭ rete. Mi laboris por la kreado de reta kurso KIREK de IEF preparante la ekzercojn de la lecionoj. La kurso havas dek lecionojn kaj oni proponas ĝin rete kun helpantoj. Mi estas la administranto de la reta kurso KAPE por Italio. Mi nun estas estrarano pri kongresoj en ILEI kaj la alia okupo estos lerneja agado.



---

<sup>2</sup> <https://www.nodo50.org/esperanto/artik39.htm>



## Marija JERKOVIĆ

Mi estas Marija Jerković, emerita instruistino pri la angla kaj la kroata lingvoj.

Mi konatiĝis kun Esperanto kiel studentino kaj kiam mi ekposteniĝis, mi enkondukis Esperanton en mian lernejon kiel fakultativan studobjekton.

Mi gvidis grupon da 10 lernejanoj, kiuj partoprenis en landaj konkursoj pri scio de Esperanto kaj venkis naŭ fojojn.

Mi diplomiĝis pri interlingvistiko ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Pollando kun tre bona noto.

Nun mi gvidas kursojn por plenkreskuloj kaj, kiel prezidanto de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, organizas prelegojn pri aktualaj temoj.

## Alessandra MADELLA

Alessandra Madella, studinta Japanan Lingvon kaj Literaturon ĉe la Universitato Ca' Foscari de Venecio (Italio) kaj ĉe la Universitato de Tokio (Japanio), doktoriĝis pri Komunikaj Studoj (Retoriko) ĉe la Universitato de Iowa (Usono) pere de disertacio pri la franca filmo *Hiroshima mon amour*. Dum pluraj jaroj ŝi instruis Mondan Film-Historion kaj Esperanton ĉe la Artkolegio de Kunming (Ĉinio).

Ŝi zorgas pri la varbado por la esperantema projekto de ekologia animacio „Savu la Planedon kun Kungfua Kuniklito” kaj mem realigis la animacion en Esperanto „La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo”.



## Ahmad Reza MAMDUHI

Ahmad Reza Mamduhi, studinta arkitekturon kaj urb-dezajnado en la Nacia Universitato de Irano (Ŝahid Beheŝti Universitato), profesie arkitekto kaj urb-fasonisto, estis la unua ĉefdelegito de UEA en Irano meze de la 1980-aj jaroj. Ankaŭ nun li rehas tiun respondecon. Li estis elektita kiel la unua prezidanto de IrEA (Irana Esperanto-Asocio) kaj reelektiĝis tiupostene duafoje.



Ekde pli ol 40 jaroj li instruas Esperanton en diversaj lernejoj kaj universitatoj de Irano. Krome li gvidis divers-nivelajn E-kursojn en IrEA ĉu ĉeeste ĉu virtuale. La plej lastaj virtualaj kursoj, kiujn li gvidis, okazis en la ŝtata Universitato de Ŝirazo meze de Irano kaj la ŝtata Universitato de Mazandarano, norde de Irano (ankoraŭ daŭrigata).

Li verkis perslingvan lernolibron por memlerni kaj/aŭ instrui Esperanton (pli ol 600 paĝojn), titolitan „La Plej Facila Lingvo de la Mondo” (2005, Tehrano), kaj perslingvan enciklopedieton pri Esperanto (pli ol 400 paĝojn) titolitan „La Fenomeno Esperanto: la solvo de la internacia lingvo-problemo” (2005, Tehrano). La kompletaj tekstoj de ambaŭ libroj elŝuteblas senpage ekde ilia papera apero el diversaj retejoj, i.a. tiu de IrEA.

Ekde novembro 2003 li kontribuas abunde al la Esperanta Vikipedio (ĉu verkante ĉu tradukante), kaj al la persa kaj angla Vikipedioj pri diversaj aspektoj de Esperanto.



## Fernando PITA

Mi estas Fernando Pita, 52-jara brazilano, esperantisto ekde 1984. Profesie mi estas profesoro de la Latina Lingvo ĉe la Ŝtata Universitato de Rio-de-Janeiro (UERJ).

Krom kursoj de Esperanto, faritaj diversloke, mi ĉeestis kaj konkludis la Interlingvistikajn Studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano (Pollando), dum la jaroj


2014-17. Mi instruis Esperanton en Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro kaj en Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Ekde 2015 mi ankaŭ eldonas, tradukas aŭ verkas librojn en/pri Esperanto. Paralele al tio, mi ankaŭ verkis diversajn recenzojn kaj artikolojn, por publikigo en diversaj Esperantaj periodaĵoj: *Rio Esperantista*, *Brazila Esperantisto*, *Literatura Foiro*, *Esperanto*, *Beletra Almanako*, *Monato* ktp.

Mia precipa laborpropono en la estraro de ILEI estas alproksimigi Esperanton al la universitata kaj scienca mondo.

## Bilanco de ok jaroj en la prezida ofico 2013-2021

*Prelego de Mireille GROSJEAN en VEK12*

Mi elektiĝis en 2013, kiam la prezidanto Stefan MacGill volis salti al la Estraro de UEA. Do mi unue finis lian mandaton, el kiu restintis du jaroj. Poste mi elektiĝis denove en 2015 kaj en 2018. La Estraro evoluis dum tiuj ok jaroj. Nur la kasisto Vilĉjo Harris kaj la respondeculo pri Kongresoj Radojica Petrović, kiu organizis niajn kongresojn ĝis 2019, akompanis min tra tiuj ok jaroj. Mi devas ankaŭ mencii la laboron de Sebastian Cyprych, kiu prizorgas la membraron, kaj Marija Beloŝeviĉ, kiu organizas la aperon de ILEI dum UK kaj fakte faras multe pli. Ni povas plie kalkuli je la helpo de Ralph Schmeits en la Centra Oficejo de UEA, kiu prizorgas la aferojn de ILEI en nia jura sidejo nederlanda.



*Surfote: La du prezidantoj en VEK12*

Mi devas substreki la **bonan kunlaboron** kun UEA, kiu regule kontribuas al nia vivo per financa disponigo de 3000 EUR jare. Mi esprimas nun

publikan dankon al UEA. ILEI rajtas havi unu komitatanon A en la Komitato de UEA; en tiu ĉi jaro Ivan Colling, vic-prezidanto, transprenis tiun taskon. La aperigo de nia *Esperiga Komunikilo* **EKO**, redaktita de Stefan MacGill kaj mi, ebligas vastan informadon pri la agadoj de la Ligo. Paĝoj pri la vivo de la Ligo aperas regule en la revuo *Esperanto*, kun bonega kunlaboro kun la redaktoroj. Ni devas nepre evoluigi pli da kontaktoj kun **TEJO**. Sekvenda temo. Ni havas laborkontrakton kun LIBE, la blinduloj, kaj kun IFEF, la fervojistoj.

La **rutinaj taskoj** evoluis sufiĉe bone: aperigo de **IPR** kun brila kontribuo de ĝia redaktoro Jozefo Németh, organizado de niaj konferencoj, kiuj fariĝis kongresoj en Pusan, Koreio, en 2017. Tamen mi vidas mankojn: mankis rigora sekvo de la komitataj kaj estraraj decidoj, mankis rigora sekvo de la agado kun la sekcioj kaj kontaktoj kun ili.

Pri nia **financa vivo** laŭ sugesto de Sten Svenonius ni revenigis nian monon el Svedio al Nederlando pro la fakto, ke la bankoj evoluigis siajn postulojn pro la progreso de la teknikaj iloj. Ne nepre necesas, ke nia bankokonto estu en la lando de nia kasisto. La financa situacio de ILEI ne estas sana, la nova Estraro devos atenti pri tio. Tamen niaj diversaj fondaĵoj havas iom da financa forto kaj povus subteni diversajn projektojn. Nia Koleg-helpa kaso daŭre atendas donacojn.

Paneas la eldono de niaj **kongresaj libroj**: ne aperis KL por Ĉaĉak, Serbio, ne aperis la KL por VEKI 1. Ĉu ni sukcesos aperigi KL por VEKI 2? Jen la demando.

ILEI akiris ISBN kaj ni havas nun rezervon de tiuj numeroj, kiuj donas firman bazon al ia **eldonaĵo**.

ILEI povis kalkuli je la brila laboro de Katalin Kovats por eldoni la *Manlibron pri Instruado de Esperanto*, kvara eldono, kunlabore kun E@I. Tio estas tre grava evento en la nun priskribita epoko. En fina provlegado estas lernolibro en la svahila lingvo, kies aŭtoro estas Nino Vessella.

Nia **retejo** [www.ilei.info](http://www.ilei.info) estas tre efike prizorgita de Jozefo Németh. Tamen la retejo estas malnova kaj multaj novaj aldonoj kaj ideoj ne eblas. Renovigo estas planata. Sekvenda temo. Ni havas kelkajn Facebook-paĝojn kaj ni havas grupon en Telegram. Plie ni havas paĝon en Youtube kun la nomo Esperanto + Edukado ILEI.

Mi menciuj nian duan revuon **JA** kaj la elstaran laboron de ĝia redaktoro Stano Marček. Komence estis parte nigra-blanka revuo, kiu aperis trifoje

jare. Ni iris al plenkolora eldono kvarfoje jare. Brilas nia revuo, tamen tio endanĝerigas nian financon situacion. Sekvo de tio estis altigo de niaj kotizoj. La nombro de abonantoj devas duobliĝi aŭ eĉ pli. Sekvenda temo.

**Komisionoj** ekzistas ĉe ILEI, bedaŭrinde kelkaj dormas. Ni menciuj la aktivan Komisionon pri Universitata Agado, ĝi kreskis kaj bone laboras. Mi volas danki Aurora Bute, prezidanto de la Elekta Komisiono, kiu multe laboris por prepari la nunajn elektojn.

**La lingvaj ekzamenoj de UEA/ILEI** daŭre validas kaj sesioj okazas, eĉ se la KER-ekzamenoj havas pli da sukceso. Ĉar la KER-ekzamenoj ne havas sekcion kun demandoj pri kulturo kaj movado, ekzistas ĉe ILEI embrio de nova ekzamensistemo kun nomo *KOMO*, por Kulturaj kaj Movadaj konoj. Sekvenda temo. ILEI kreis ekzamensistemon por blinduloj.

EIT signifas Esperanto-instruista Trejnado. Ni povis doni diplomon al Elisabeth Le Dru, Nicolao Dols, Viko Manzano Arrondo, Patrick Manirakiza kaj Gilbert Ndiokubwayo. Skemo por nova strategio ekzistas.

**Honoraj Membroj** aperas en nia retejo. Pluraj talentaj kaj laboremaj esperantistoj ricevis tiun titolon. Ne venis proponoj por 2021.

La **Premio La Torre** venas de la familio de nia eksprezidanto Mauro La Torre. Jam dufoje ni povis kune kun la familio La Torre disdoni ĝin. Laŭ la regularo kaj kun ĵus ricevita aprobo de la familio, ni devas relanĉi alvokon nun.

La **Retlisto e-ins** funkcias tra la jaro kaj ebligas kontaktojn, same kiel la Telegram-grupo kaj la Facebook-paĝoj. La YouTube-kanalo de ILEI ebligas prezenti multajn filmetojn.

Daŭre kaj regule ILEI produktas **varbilojn**. Stoko de okpaĝaj varbiloj en la franca kaj en la angla kuŝas ĉe mi. Se vi bezonas kelkajn, bonvolu diri al mi, mi sendos tion al vi.

### **Novaj projektoj aperis kaj konkretiĝis:**

„**Ni Savu Niajn Semojn**”: programo, kiu stimulas ĉiujn instancojn zorgi pri papera eldono de diversaj gravaj dokumentoj. Ofte la dokumentoj kuŝas nur en komputiloj, kaj tio povas esti danĝera. NSNS rememorigas homojn pri la valoro de paperaj eldonoj kaj adekvata konservado. Tio gvidas min al proksima temo: la arkivoj de ILEI. Parte en Massa, Italio, parte en Herzberg, Germanio, parte en CDELI en La Chaux-de-Fonds, Svislando, ili kuŝas dise.

Mi provis kolekti ilin kun pli-malpli da sukceso. Nun estas kolektejo en Zaozhuang, Ĉinio. En Usono diversaj universitatoj povus fariĝi deponejoj, jen sekvenda temo. Poste devus sekvi Afriko. Tiel ke estu bibliotekoj, deponejoj sur ĉiu kontinento.

„**Komuna legado okaze de la Tago de la Libro 15-a de decembro**”. En 2016 ni elektis tekston de Tibor Sekelj, en 2017 de Verda Majo, en 2018 de Julián Hernández Ángulo, en 2019 de Hodler, en 2020 de Julia Sigmond. Facebook-paĝo pri tiu programo ekzistas.

„**Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la mondo**”. En laborgrupo la projekto naskiĝis okaze de Novjara Renkontiĝo en Germanio en 2016. Poste mi kompletigis la dokumentaron kaj metis ĝin en la ILEI-paĝaron. Aldoniĝis tradukoj al la turka, itala, franca, angla, paralele kun samtema broŝuro de Klaus Friese.

En 2016 ILEI kandidatiĝis por esti agnoskita NRO ĉe **UNESKO**. Ni daŭre estas en atendo de la decido de tiu tutmonda instanco. Sekvenda afero. UEA taskis al mi ekrilati kun UNESKO por peti salutmesaĝon por UK. Tio bele sukcesis en 2018 kun saluto de Audrey Azoulay kaj en 2021 kun saluto de Taoufik Jelassi.

**La Jaro de la Lernanto** estis komuna projekto de UEA kaj ILEI. Ĝi okazis en 2016-17. La fokuso estis ĉe la fenomeno lernado kaj la nova rolo de instruisto kiel akompananto.

Kunlabore kun UEA, ILEI kreis retejon **esperanto-centroj.info**. Ĝi pretas, restas la diskonigo farenda.

Kunlabore kun Yves Nevelsteen kaj laŭ la ideo de Ahmad Reza Mamduhi ni aldonis interesan eblon en **Eventa Servo** (eventaservo.org): eblo mendi **prelegojn kaj lecionojn** ĉe altnivelaj esperantistoj kaj instruistoj. Momente, 28 prelegantoj kaj 35 instruistoj ofertas siajn kontribuojn.

Komence de 2021 mi lanĉis la monatajn **Forumojn** por ILEI-gvidantoj. Tiaj kunvenoj alportis multe da novaj ideoj.

La **Tria Tutmonda Kolokvo** pri Instruado de Esperanto okazis en la kantono Neuchâtel en Svislando dum kvar tagoj en 2015. Multaj interesaj prelegoj aŭdiĝis dum tiu evento.

**Signolingvo** en Eo ekzistas. En Homrajta Konsilio en Ĝenevo la direktoro de *Handicap International* venis al mi por peti, ke ni sukcesu lanĉi

internacian signolingvon, kiu solvus la problemon de la diversaj nun uzataj signolingvoj. Sekvenda temo.

Plie estas **sekreta** plano, kiu eble alportos sukceson ne nur al ILEI. Granda laboro, granda efiko. Mi informos mian posteulon pri ĝi.

Jen karaj. Mi vidas klare la mankojn en mia laboro. Mi volas ĉi tie danki al miaj kolegoj de la Estraro kaj al vi de la Komitato. Mi esperas, ke nun freŝa skipo gvidos la ŝipon ILEI efike kaj sukcesplene.

Mi dankas pro via atento.

### *ILEI-simpozio 2021 (12/13 aŭgusto)*

## **Esperanto en universitataj medioj – nuntempo kaj estonteco**

*de Radojica PETROVIĆ (Serbio)*

La simpozio okazis virtuale, enkadre de VEKI-2, kiel unu el la projektoj de la Universitata Laborgrupo. La simpozia temo altiris 14 prelegantojn, multajn aŭskultantojn kaj diskutantojn en la Zoom-simpozio kaj ĝia tajp-babilejo, kaj sekvantojn per la jutuba kanalo UEAViva, kies plej interesaj komentoj kaj demandoj estis perataj en la virtualan simpoziejon.

En la enkonduka prelego, titolita *Komunikado en multlingvaj edukmedioj – problemoj kaj solvoj*, Charles Ligan (Universitato de Abomey-Calavi, Benino) traktis problemojn de edukado en plurlingvaj medioj de Afriko, kie kelkaj koloniaj lingvoj renkontiĝas kun la multaj lokaj lingvoj. Li prelegis franclingve, interpretis Mireille Grosjean (ILEI). Giridhar Rao (Universitato "Azim Premji", Barato) komentis la prelegon aldonante baratajn perspektivojn de la problemaro. Sekvis komentoj kaj demandoj el la publiko kaj unuhora podia diskuto.

Ilona Koutny (Universitato "Adam Mickiewicz" en Poznań, Pollando) prelegis pri *Esperanto en supera edukado – mitoj kaj faktoj*. Ŝi resumis atingojn kaj pozitivajn spertojn kun Esperanto sur la tereno de supera edukado, kaj analizis problemojn kaj obstaklojn survoje al la virtuala Esperanto-universitato. Gong Xiaofeng - Arko (Universitato de Nanchang, Ĉinio) kontribuis per *Konciza Enkonduko al la Disvolviĝo de Esperanto-Instrua Movado en Ĉinaj Universitatoj*. Alessandra Madella (Artkolegio de Kunming, Ĉinio), Daniele Binaghi ([www.bitoteko.it](http://www.bitoteko.it)) kaj Enrico Borrello



(Nacia Biblioteko de Esperanto de Massa, Italio) prelegis pri *La sperto kolekti, resumi kaj disponigi interrete la italajn diplomlaboraĵojn kaj disertaciojn pri Esperanto*. La plejmulto el la 54 ĝis nun kolektitaj laboraĵoj estas senpage elŝuteblaj el [www.bitoteko.it](http://www.bitoteko.it) kaj konsulteblaj ĉe la Nacia Biblioteko de Esperanto de Massa. La TEJO-anoj Manuela Burghilea (Brazilo), Albert Stalin Garrido (Filipinoj), Lucas Teyssier (Francio) per triparta prelego *Studentaj spertoj kaj perspektivoj pri Esperanta universitata agado* prezentis universitatan agadon de TEJO. Davide Astori (Universitato de Parma, Italio) per prelego *Instrui Esperanton en la Universitato de Parma* prezentis siajn spertojn el universitata instruado de Esperanto. La unua simpozia tago finiĝis per podia diskuto pri *Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj - la studenta perspektivo*.

La duan simpozian tagon malfermis Manuel Pancorbo (Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado - UNED en Madrido) per prelego pri defioj kaj rezultoj de neĉeesta instruado de Esperanto: *Instruado de Esperanto en universitato UNED*. Komentis kaj diskutis kun li hispanlingve Maria Josele Bucco Coelho (Universitato de Paranao, Kuritibo, Brazilo). Interpretis Duncan Charters (Kolegio Principia, Usono). Sekvis prelego de Renato Corsetti (Universitato "La Sapienza", Romo) titolita *Ĉu Esperanto estas facila? Spertoj el perreta kurso de Esperanto al azianoj*. Li aparte substrekiis specifiaĵojn de Esperanto kiuj faras ĝian lernadon malfacila por azianoj alimaniere kaj pli ol por eŭropanoj. Tio malfermas apartajn didaktikajn demandojn kiel taskon por ILEI kaj instrumentodistoj de Esperanto.

Vicente Manzano-Arrondo (Universitato de Sevilla, Hispanio) per sia prelego *Pri Esperanta Universitato* analizis kia povas esti Esperanta Universitato, kiujn principojn ĝi sekvu kaj kiuj estas la unuaj farindaj paŝoj por realigi ĝin. Pri lia prelego diskutis Elisée Byelongo Isheloke (Universitato de Kaburbo, Sud-Afriko). Angela Tellier (Universitato de Essex, Britio) verkis provizoran raporton pri ankoraŭ ne finita *Enketo pri graveco de Esperanto en universitatoj*, kiun prezentis Radojica Petroviĉ (Universitato de Kragujevac, Serbio).

La simpozio finiĝis per konkluda podia diskuto, kiu konfirmis la grandan interesiĝon de simpozianoj pri la traktitaj temoj kaj levitaj demandoj. La simpozio liveras abundan materialon por pluevoluigo de jamaj kaj novaj projektoj sur la universitata tereno. Ĉiuj simpoziaj prelegoj kaj diskutoj estis vive elsendataj kaj registritaj en YouTube kaj atingeblas per [youtu.be/uojXgLrDwho](https://youtu.be/uojXgLrDwho) (la unua tago) kaj [youtu.be/zGNWveksPsA](https://youtu.be/zGNWveksPsA) (la dua tago).

## KUNGFUA KUNIKLETO sin prezentas dum VEKI2

*Intervjuo al Maximiliano GARCIA, produktanto de la ekologia animacio de Alessandra MADELLA (Italio)*

*AM: Saluton, mi estas Alessandra Madella kaj hodiaŭ mi havas la grandan honoron intervjui por vi Maximiliano Garcia, la produktanton de tre interesa projekto: la ekologia animacio „Savu la planedon kun Kungfua Kunikleto.”*

MG: Dankon, kara Alessandra. Bonan tagon al vi kaj al nia tuta publiko. Verdire, la honoro estas tute mia. Mi precipe ŝatus multe danki Mirejon, la prezidantinon de ILEI, kaj la tutan teamon de VEKI-2 pro la ŝanco povi paroli al vi pri nia projekto de Kungfua Kunikleto.



*AM: En la Jutuba kanalo de ILEI jam estas videoj pri via projekto kaj ili certe estas inter la plej ofte rigardataj de la ttt-ejo. Tio estas pruvo, ke temas pri tre originala afero kaj ke oni sentas ĝian potencon utilecon por instruistoj. Laŭ vi, kial homoj – kaj precipe instruistoj de Esperanto – interesiĝas tiel multe pri la projekto?*

MG: Mi kredas, ke verŝajne la kialo estas, ke ankoraŭ ne ekzistas tiom multe da serioza kaj samtempe amuza materialo por eduki el junaĝo. Ne temas nur pri Esperanto, sed pri pli ĝenerala problemo, kiun eble en Esperantujo oni nur sentas pli forte. La plejmulto de la libroj kaj animacioj por infanoj, geknaboj kaj gejunuloj montras nur tre supraĵajn ideojn, ofte kun teruraj kaŝitaj aŭ ne kaŝitaj mesaĝoj. Mi mem estas patro kaj mi bone scias tion. Certe, estas granda merkato de libroj por lingvo-lernado, ekzemple en la angla. Sed ili precipe utilas por disvolvi leg-kapablojn en alia lingvo, dum ili maltrafas la ŝancon instrui samtempe iom pri la ideoj, kiuj vere gravas por nia vivo. Esperantaj instruistoj bone scias tion, ĉar lastatempe la temo de daŭripova evoluigo iĝis tre grava en Esperantujo. Ni povas diri, ke ĝi estas preskaŭ unu el la ĉefaj motoroj de la rilatoj inter esperantistaj instancoj kaj UN aŭ UNESKO. Pro tio, Humphrey Tonkin skribis pri nia projekto de Kungfua Kunikleto en la informilo por la Unuiĝintaj Nacioj. Esperantistoj volas kunmeti la protektadon de lingvaj rajtoj de malplimultoj kun pli granda konscio de la protektado de nia planedo. Kaj tiuj estas du idealoj, kun kiuj la Kungfua Kunikleto forte simpatias.

*AM: Kial la Esperanta publiko – kaj precipe la publiko de instruistoj de Esperanto – estas tiel grava por vi?*

MG: Nu, Esperanto estas multe pli ol lingvo, ĉu ne? Instrukistoj de Esperanto estas perfekta publiko, ĉar ili bone scias, ke ankaŭ por instrui lingvon rakontado estas grava. Infanoj kaj geknaboj pli facile preparolas kaj memoras gravajn ideojn, kiam oni kaptas ilian imag-kapablon. Estas malfacile por ili pritrakti kun la sama entuziasmo kaj demandemo tute abstraktan aferon. Ekzemple, ni volis trovi manieron kritike pensigi ilin pri la rilato inter la kronviruso kaj la grandegaj financaj gajnoj de tutmondaj korporacioj. Do, ni enkondukis la du malbonulojn de la serio, kiuj fi-agas ĉi-rilate. Ankaŭ en nia epizodo pri teo, kiun oni plantas kontraŭ dezertigado kaj kiel kuracan manĝaĵon, ni zorgas komprenigi al niaj junaj spektantoj, ke nia imag-kapablo estas ĉiam granda rimedo por ni. Same Esperanto naskiĝis kiel konkreta rimedo, elpensita fare de la imag-kapablo de infano, por klopodi solvi la grandan problemon de lingva malegaleco kaj miskompreno.



*La teamo de la Kunikleto vizitas la budon de ĉina eldonejo*

Ekzistas ĝis nun skizitaj film-verkoj por 52 epizodoj kaj la efika rakontado de gravaj ekologiaj problemoj estas ĉiam nia centra celo. Tio povas vere helpi la uzadon en klasĉambro kaj ekster ĝi. Fakte, instruistoj bone scias, ke vere efika instruado ne finiĝas ene de klasĉambro, sed spontane pensigas nin pri la preparolitaj aferoj eĉ ekster ĝi. Kiel patro, mi ofte ĉagreniĝas, ke ne estas sufiĉe da helpo por paroli kun niaj filoj serioze pri gravaj temoj, kiel ekologio. Do, ni kreis la Kungfuan Kunikleton kiel ilon uzeblan ne nur en klasĉambro, sed ankaŭ kiel manieron kunpensi gepatrojn kaj gefilojn pri la defioj de nia planedo eĉ ekster instruaj horoj.

*AM: Kion Kungfua Kunikleto havas, kio estas malsama de ĉiuj aliaj eblaj similaj projektoj? Ĉu estas io, kio alproksimigas ĝin pli multe al esperantistaj valoroj?*

MG: Mi vere dankas vin pro tiu ĉi demando, ĉar ĝi donas al mi la ŝancon vere klarigi la econ de nia projekto. Unue, laŭ mia kono, ne ekzistas aliaj dulingvaj infanaj libroj kaj serioj de 30-minutaj animacioj en 3D kaj 4K, kiuj klopodas disvolvi la kritikan pensadon de la infanoj pri sia ĉiutaga vivo. Ni volas, ke ili mem deziru vivi en socio pli amika al la medio, komprenante, ke nur niaj pozitivaj agmanieroj povas helpi nin krei pli bonan estontecon. Fakte, ne estos estonteco, se ni ne ŝanĝos pens- kaj viv-manieron.

Nia animacio baziĝas sur scienca esplorado. Ni konsultis fakulojn pri la konceptoj kaj la detaloj de ĉiu ĉapitro, kompreneble ĉiam adaptante la rezulton al la aĝ-grupo de nia ĉefa publiko. Ni aldonas faktojn pri la kunteksto, pripensante kiel, ekzemple, la manko de trinkebla akvo, la malapero de abeloj aŭ la fandiĝo de glaci-montoj afekcias nin. Sed ni ankaŭ pensigas pri la konsekvencoj uzi saĝ-telefonon aŭ pri la poluado de la kosma spaco, kiu estas la negativa flanko de nia konkero de ĝi. Estas multege da pridiskutendaj problemoj, pri kiuj oni kutime ne parolas en lernejoj klasĉambroj, ĉar oni ne scias kiel oni povus tion fari. Ni, male, volas, ke niaj infanoj estu konsciaj pri ili kaj ke, kiam ili kreskos, ili kapablu agi por protekti nian medion kaj sian estontecon. Mi vidas la saman intereson akiri verajn informojn pri gravaj problemoj kaj kritike kompari ilin en multe da membroj de la Esperanta publiko. Do, certe estas komuneco de celoj.

*AM: Vi jam ekstudis Esperanton kaj nun ankaŭ NingNa, la alia produktantino de la Kunikleto, estas serĉanta Esperanto-kurson en sia urbo en Ĉinio. Kiel vi pensas, ke la Kunikleto povus esti uzata en la instruado de Esperanto?*

MG: Esperanto estas internacia lingvo, sed la komunumo de ĝiaj parolantoj estas unu el la plej internaciaj lingvaj kokteloj de la mondo. Mi multe miris pri via animacio „La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo,” pri kiom multe da homoj helpis vin eĉ internacie, sendante al vi siajn voĉojn, tradukante ĝin en diversajn lingvojn ktp. Mi mem multe ĝuis sendi al vi mian voĉon kiel la ekologiema franca profesoro. Mi certas, ke tiu mirinda rezulto ne estus ebla sen la helpo de la Esperanta mondo, kiu ne konas limojn kaj kapablas entuziasmiĝi pri interesa kaj signifoplena projekto. Samtempe, mi multe aprecas kiel via animacio mem estas instrua ilo.

Kompreneble, nia projekto estas tre malsama kaj verŝajne tro profesia por povi esti tiel „komunuma”. Tamen, havi la helpon de esperantistoj en la tradukado de niaj du-lingvaj libroj, animacia serio, apoj ktp. ebligus pretigi materialon, kiu estus tre taŭga por instruado. Instruistoj bone scias, ke estas tre grave eĉ por lingvaj kursoj havi ankaŭ materialojn pri diversaj, pridiskutendaj temoj por riĉigi la vortrezoron de la gestudentoj. La animacio mem kaj la rakontoj de la libro povus iĝi la unua inspiro por aktive uzi E-on en klasĉambro, parolante kaj esplorante en grupoj pri gravaj temoj, sed en mojosa maniero. NingNa kaj mi multe kredas je tiu ĉi parto de la projekto kaj pro tio ni volas lerni E-on. Fakte, nun „Kungfua Kunikleto” en Esperanto estas la oficiala nomo de la heroo en ĉiuj lingvoj, en kiuj ni planas la serion.

*AM: Mirejo diras, ke esperantistoj devus lerni mem fari mojosajn mallongajn filmojn, kiuj povus esti uzataj en la lecionoj de Esperanto. Kion vi pensas pri tio?*

MG: Laŭ mi, tio estas bonega ideo. Estas tre grave, ke homoj povu partopreni en la kreado de rakontoj, la disvolvo de projektoj kaj tradukadoj. Ankaŭ por plenkreskuloj tiu aktiva filmfarado estas tre bona lernilo, kiel via sperto mem pri Saĝa Steleto montras. La komuna partopreno estas la sekreto. Se fari animacion estas tre malfacile por infanoj, ankaŭ kunmeti desegnaĵojn kun amikoj el ĉiuj partoj de la mondo aŭ kune elpensi rakontojn aŭ kantojn povus esti nekredebla eduka sperto por ili. Eble tio estas la senco de la aserto de Mirejo, kiu bone komprenas, ke infanoj estos civitanoj en nia diĝita aŭ cifereca mondo. Ni estas pensantaj same, ĉar en la lasta epizodo de nia serio sep kunikletoj naskiĝas, por ke infanoj povu imagi aliajn rakontojn kun ili.

*AM: Kion donis al vi Esperanto?*

MG: Eble la internacia Esperanta familio donis al mi precipe grandan kialon vivi. Ĝi pelas min realigi mian vizion trans ĉiujn limojn: naciajn, religiajn

ktp. Estas vere potenciga kaj ĝojiga sento. Pro tio, mi multe esperas, ke esperantistoj kaj precipe Esperantaj instruistoj helpos nin realigi nian ideon. Se vi ankoraŭ ne spektis ĝian videon, bonvolu fari tion nun en la jutuba kanalo de ILEI: <https://www.youtube.com/watch?v=n2zCHse8jQg&t=9s>. Kaj, kial ne, bonvolu kanti la Puera-kanton kune kun ni. Pacon al ĉiuj!

## La Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Arkivo de Massa

*Enrico Gaetano BORRELLO kaj Alessandro SIMONINI*

Saluton, mi estas Enrico Borello kaj mi estas volontulo ĉe la Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Arkivo de Massa. La urbo Massa troviĝas en centra Italio, en la regiono Toskanio. Ĝi estas fama pro la bela maro kaj la montoj, el kiuj Michelangelo mem elektis la blankan marmoron por multaj el siaj famaj statuoj. Ekde la kvindekaj jaroj, ĝi estas aktiva centro de Esperanto en Italio, kiel bone montras la Esperantaj nomoj de ĝiaj stratoj, krom ĝia aparte grava biblioteko.

### La ideo



Profesoro Mario Dazzini (Pietrasanta 1910 - Massa 1985) unua havis la ideon de itala nacia biblioteko, kiu kolektu ĉion eldonitan en Esperanto. Dazzini komencis studi Esperanton je la aĝo de 17 kaj perfektigis kun Profesoro Campetti de la proksima urbo Lucca. Li poste translokiĝis kun sia familio al Massa, kie lia fratino Catina (1917 - 1997) iĝis instruistino en la loka supera mezlernejo.

Ekde 1953, kune kun sia fratino Catina, Mario Dazzini realproksimiĝis al la Esperanto-Movado kaj al la internacia lingvo, kiun en tiuj jaroj instruis en Carrara profesoro Antonio Grosso. Profesoro Grosso en 1953 ankaŭ fariĝis la unua prezidanto de la naskiĝanta Esperanto-grupo de Massa.



Catina Dazzini esperantistiĝis en 1953. Ŝi tre aktivis por Esperanto kaj ILEI kune kun sia frato Mario Dazzini, kiu estis prezidanto de ILEI kaj en 1985

iĝis Honora Membro de ILEI. De 1977 ĝis 1997 ŝi estis ĉefdelegito de UEA por Italio. De 1960 ĝis 1996 ŝi estris la italan ILEI-sekcion. Ŝi ankaŭ estis sekretario de ILEI.

### **La kreskado**

La Nacia Biblioteko de Esperanto en Massa komencis kreski, krom per la personaj libroj de la gefratoj Dazzini, danke al la aparta donaco, en 1972, de la fam-konata lingvisto Bruno Migliorini kaj de lia same fama geografa frato Elio Migliorini. Ĉi tiu donaco inkluzivis interalie la raran Gramatikon de Marignoni de 1890, „Esperanto, la plej praktika el internaciaj lingvoj”.

Oni devas konsideri la privatan naturon de la iniciato, la mankon de kontribuoj de instancoj kaj institucioj, la plejparte eksterlandan produktadon de publikaĵoj kaj la nesufiĉan atenton pri la temo fare de la publika opinio. En tiuj kondiĉoj, la kresko de la libra heredaĵo povis okazi nur danke al donacoj de privataj bibliotekoj, starigitaj kun pasio kaj kompetento fare de italaj fakuloj pri la verkaro de Zamenhof.

Post la unua kerno, fariĝis parto de la Biblioteko la kolektoj de famkonataj esperantistoj, kiel la advokato Giuseppe Stanislao Boscarino, Luigi Minnaja el Romo, la pastro Giacomo Bianchini kaj la rektoro de la Universitato de Parmo kaj Prezidanto de UEA Giorgio Canuto. Tre rimarkinda estas la kolekto de profesoro Corrado Grazzini de Florenco, sed ankaŭ multe da malpli konataj homoj kontribuis.

Unue la biblioteko troviĝis en la hejmo de la gefratoj Dazzini. Poste ĝi trovis sidejon en kastelo Malaspina, sur la altaĵoj de la urbo Massa. Fine, en 1994, ĝi translokiĝis al la palaco de la Ŝtat-Arkivo de Massa, post la oficiala donaco al la Arkiva Administracio de la Ministerio pri Kultura kaj Media Heredaĵo de la Itala Ŝtato. La valoro de la donaco estis taksita je 250 518 000 tiamaj italaj liroj.

La plej lasta granda pliriĉigo de la kolekto okazis en 2020, danke al donacoj de la elstaraj Esperantaj verkistoj Filippo Franceschi, plumnomo Sen Rodin, kaj lia edzino, Júlia Sigmond. Krome, alvenis ankaŭ ĉirkaŭ mil libroj de la fermita Biblioteko „Glauco Corradi” el Milano.

### **La katalogado**

La unua klopodo katalogi la eldonaĵojn de la Biblioteko estis farita en 1999 fare de Alessandro Simonini kaj de mi – Enrico Gaetano Borrello –, membroj



de la Esperanto-Grupo de Massa (vd. la *foton apude*). Ĝi finiĝis post la kompilado de ĉirkaŭ cent slipoj rilataj al la vortaroj. La eksperimento estis tre utila por konstati, ke la katalogado de tiaj heterogenaj tekstoj, publikigitaj en ĉiuj mondo-partoj, povus esti efektivigita nur fare de spertaj fakuloj.

Do, surbaze de detala projekto fare de la Esperanto-grupo de Massa, la skabeno pri kulturo de la Regiono Toskanio, Marcella Zoppi, aprobis la kreadon de la katalogo de la Biblioteko. La dekreto aprobis la financadon de 40% (kvardek procentoj) de la projekto, atribuante ĝian realigadon al la Provinco Massa Carrara.

La kataloga kaj lokiga laboro laŭ Dewey-Sistemo ekis en januaro 2007, danke al la bibliotekosciencia Asocio „Il Borgo” de Carrara, kunordigita fare de d-ro Lanfranco Raiani, kun la libervola helpo de la Esperanto-profesorino Rosa Baldoni kaj D-ro Alessandro Simonini. La laboro finiĝis en majo 2008 per la eldono de la presita Katalogo. Tiun ĉi jaron dua profesia katalogado estis kompletigita, fare de la menciita D-ro Raiani, de la kooperativo Art-Arte, dank’ al subvencio ricevita de ESF, al kiu aldoniĝis kontribuo de Itala Esperanto-Federacio. Danke al tiu helpo estis katalogitaj pliaj 1 200 libroj.

## La enhavo

La Biblioteko de Massa, krom kolekti ĉirkaŭ 180 periodaĵojn, specialiĝas pri la lingvaj kaj literaturaj aspektoj de Esperanto. Fakte, ĉirkaŭ duono de la libroheredaĵo konsistas el tradukoj de prozaj kaj poeziaj verkoj el la tuta mondo, kompreneble inkluzive de la ĉefaj italaj verkoj. Koncerne nefikcion, ekzistas tekstoj pri la plej diversaj temoj de la homa scio: de filozofio ĝis medicino; de historio ĝis matematiko; de astronomio ĝis botaniko; de geografio, lingvistiko, ekonomiko, politiko, teologio ĝis spiritismo.

Necesas ankaŭ atentigi pri la havebleco de diversaj tekstoj pri aliaj artefaritaj lingvoj, kiel la „norda” Volapuko, Ido aŭ Interlingua de Peano. Inter la plej reprezentataj eldonejoj, troviĝas ĉiuj eldonaĵoj de la multmerita Antonio Paolet de S. Vito al Tagliamento, specialiĝinta pri verkoj en la lingvo iniciatita de Zamenhof.



Ĝis nun estas katalogitaj 8 760 libroj, kaj pli precize 6 350 titoloj de 3 049 aŭtoroj. La katalogo estas konsultebla ĉe la adreso: <https://reprobi.erasmo.it/Opac/RicercaBase.aspx> [oni devas klaki, en la dekstra parto de la linio de la serĉadoj, sur „Massa – Biblioteca Nazionale di Esperanto (TE)”].

La Biblioteko, plene konsultebla ankaŭ pere de „Protokolo Z39.50”, estas en la reto de italaj bibliotekoj kaj la volontuloj laboradas por enmeti ĝiajn librojn kaj gazetojn en la italan katalogon „SBN – Sistema Bibliotecario Nazionale” (Nacia Biblioteka Sistema); ĝis nun estas enmetitaj en SBN 2 801 titoloj. Ĉesta konsultado eblas dum la horoj de malfermo de la Ŝtarkivo, kongrue kun kontraŭpandemiaj limigoj.

La skanado de libroj de la Biblioteko estas nuntempe plenumata, libervole, okaze de specifa peto de esploristo aŭ studento, sed teknike ne eblas, nuntempe, disponigi ĝin en la interreta katalogo. Tamen oni povas konsulti la retejon bitoteko.it de Itala Esperanto-Federacio, al kiu iom post iom estas alŝutataj dosieroj, inkluzive de tiuj de universitataj tezoj pri Esperanto.



### *Esperanto-kurso en la Biblioteko*

La Biblioteko enhavas ankaŭ aliajn kategoriojn de kulture signifplenaj materialoj. Temas pri:

- korespondado rilate al la taskoj plenumitaj fare de la gefratoj Dazzini en ILEI kaj al ĝia administrado;

- taglibroj de iliaj vojaĝoj faritaj en la Esperanta mondo, plenaj je notoj, fotoj, poŝtkartoj, programoj, turismaj broŝuroj;
- fotoj, afiŝoj, muzikoj kaj kantoj;
- arkiva materialo rilate al la administrado de Itala Esperanto-Federacio, kune kun tiu de la Grupo de Massa.

Konsiderante la apartan kulturecon de la kolektoj, estus dezirinde plifortigi la Bibliotekon, garantianta taŭgan nacian kaj/aŭ regionan financadon (ankaŭ necesan por la akto de la pli ol 300 eldonaĵoj, kiuj aperas ĉiujare tra la mondo). Estus ankaŭ necesa taŭga reklamado kaj valorigo, por antaŭenigi - en tempoj de intelekta provincismo - interesan centron por internacia kultura disvastigo.

## Ne okazas lernado sen fido

### VK 2021 Tago de la Lernado

*Mireille GROSJEAN (Svislando)*

Ne devas esti konfuzo inter instruado kaj lernado.

Instruado estas konscia agado de persono, kiu havas la celon, ke alia persono lernu.

Lernado estas ia miraklo, ke iu fakto restas en la memoro de preciza homo, aŭ ke iu fenomeno estas komprenita de tiu homo. Oni ne povas taski al instruisto, ke la lernanto lernu. La instruisto klopodas tiucelen, provas, sed sukceso ne nepre okazos.

Nun ni rigardu la sintenon de la lernanto.

Eble li aŭ ŝi DEVAS partopreni en la kurso, tamen la ideoj, pensoj, revoj okupas la kapon.

Eble li aŭ ŝi DECIDIS partopreni en la kurso kaj la motivado spronas la atenton. Tia persono suĉos la diraĵojn de la instruisto, prenos la instruiston, same kiel oni premas citronon por obteni ties sukcon.

Eble li aŭ ŝi ne POVAS lerni pro personaj zorgoj, pro malsano, problemoj privataj.

Tiuj situacioj estas komplete malsamaj. La instruisto devas kapti illin kaj adaptiĝi al ili.

La motoro de la lernado estas la motivado ĉe la lernanto, la studento. La ĉefa tasko de la instruisto estas nutri la motivadon. Tion la instruisto faros per prezento de viglaj kaj amuzaj kursoj, per pozitivaj komentoj kaj korektoj, per afabla kaj respektoplena sinteno al la gestudentoj, per transdono de informoj pozitivaj en rilato kun la akirota studobjekto.

Ni nun vidu la sintenon de la lernanto. Tiu persono renkontiĝas kun instruisto kaj oni supozas, ke la lernanto konsciiĝas, ke la scioj de la instruisto estas pli grandaj ol la scioj de la lernanto mem. Do la lernanto antaŭvidas transdonon de scioj. Pri tio la lernanto devas esti konvinkita. Li aŭ ŝi iru al la kurso kun la penso: „Mi ricevos klarigojn, mi ricevos respondojn al miaj demandoj, mi ricevos korektojn por mia hejme farita laboro.” Tia sinteno estas modesta, estas ia atenda sinteno, avida, scivolema. Eble la lernanto havas la ideon: „Mi scias nenion, mi volas ricevi sciojn.” Aŭ „Miaj scioj estas magraj, mi volas vastigi ilin.” Se tia sinteno mankas, neniu lernado okazos. Se iu persono venas al la kurso fiera pri siaj scioj, li aŭ ŝi ne lernos ion ajn eĉ de la plej bona instruisto. „Mi jam majstras tiun problemon, tiun fakon! Mi scias ĉion pri tiu temo!” La persono aperas kiel plena poto, ne estas loko por io ajn, neniu lernado eblas.

Kaj nun la fido: la lernanto devas fidi je la instruisto, devas modeste ricevi la klarigojn kaj la respondojn, akcepti ilin, bonvenigi ilin, fari lokon por ili en sia menso. Tiel okazas efika lernado. Komprenible en plej multe da situacioj la lernanto ne povas elekti la instruiston. Do laŭ hazardo okazas pozitivaj renkontiĝoj aŭ komenciĝas malfacilaj semajnoj aŭ monatoj kun ne kapabla instruisto aŭ kun ne bona rilato inter instruisto kaj lernantoj. Komprenible la lernanto devas konservi ian konstantan lumon, kiu pristudas la diraĵojn de la instruisto kaj en kazo de bezono reagis kaj rifuzas. La lernanto ne estu ŝafo stulta. Oni bone vidas, ke la ekvilibro inter fido kaj kontrolo estas tikla.

Por ilustru la sintenon de la lernanto, kiu modeste akceptas la sciojn de la instruisto, mi povas rakonti al vi epizodon de mia profesia vivo. Tiu ekzemplo montras malmodestecon kaj maleblon lerni. Mi instruis diversajn fakojn al 14 15 – jaraĝuloj. Do adoleskantoj en fizika kaj mensa evoluo, en klaso, kiu foje estis bando, kliko, adoleskantaj knaboj, kies zorgoj ne estis lernado sed ekrilato kaj sukceso kun knabinoj, kaj inverse same. Ili ne sciis, kiuj ili estas, kie ili staras, kiel ili statas, kien ili iras. En iu preciza momento de sia maturiĝo knaboj sentis, ke ili fariĝas viroj. Fiereco montriĝis. Foje aroganteco. Aŭskulti la maljunan virinon ĉe la nigra tabulo? NE! Obei al tiu maljuna virino ĉe la nigra tabulo? NE! Kelkaj rigardis min el sia sidloko kun

malamikaj okuloj; mi havis la impreson, ke kelkaj ŝatus kraĉi al mia vizaĝo. Kompreneble ili ne faris, ĉar ili estis tamen iom edukitaj. Tiaj knaboj plej ofte apartenis al latindevenaj kulturoj, estis italoj, hispanoj aŭ portugaloj, do ili apartenis al etnoj, kie masklismo regas. Viroj estas la gvidantoj de la mondo, virinoj estas duarangaj personoj je la servo de viroj. Plie mi povis konstati, ke ili obtenas ion ajn de sia patrino. La patrino estas tiom fiera, ke ŝi produktis vireton tiom belan, kapablan, memfidan, ke ŝi jesas al li pri io ajn. Do la kreskantaj knaboj obtenis ĉion de sia patrino. Kompreneble ili ŝovis sian sintenon kun sia patrino al mi.

Tamen mi ne povis ludi tiun rolon, tia rilato estis komplete fremda al mi. Mi rezistis al iliaj petoj kaj provoj, ilia vantema aŭ plorsimila sinteno ne tuŝis min. Iliaj teatrecaj diroj kaj faroj ne atingis min pli ol pluvguto sur mia pluvombrelo. Do por ili mia sinteno estas komplete surprizo kaj ŝoka rifuzo. Tio kolerigis ilin. Ĉe mi ili trovis reziston. Mi konis la fenomenon de tiu knabaĝa ribelemo, mi estis serena, mi atendis la finon de tiu momento, kiu daŭris kelkajn monatojn. Kompreneble dum tiuj monatoj modesteco ne estis en ilia repertuaro, ili nenion atendis de mi, nenion lernis. Fine de tiu ribelema fazo la etoso inter ni paciĝis kaj ni povis bonege kunlabori. Serena rilato revenis kaj lernemo ankaŭ.

Mi ŝatus ŝovi mian fokuson al alia kampo, kie tute same fido nepras. Mi volas paroli pri demokratio. En tia reĝimo la popolanoj elektas deputitojn kaj devas havi fidon al ili. Sen fido demokratio ne funkcias. Popolanoj ne povas rekte agi, sed la deputitoj estas ia interfaco inter la voĉdonantoj kaj la registaro. La informfluo kaj transdono de povo dependas de la respekto kaj de la fido. Se regas korupto, ne regas fido, demokratio ne eblas.

Nun vi partoprenas la virtualan Kongreson de UEA, vi fidas la Estraron, ke tiu skipo preparis interesajn prelegojn. Vi fidas, ke la debatoj estos pozitivaj kaj ĝentilaj. En nia Movado la fido estas centra piliero, kerna eco de nia etno. Kiam vi uzas Pasportan Servon kaj alvenas al nekonata familio en fremda lando, vi fidas, ke ĉio iros glate. Kaj tiel okazas. Tio estas kvazaŭ miraklo. Homoj ekster la Movado foje demandas: Ĉu vi ne timas? Ĉu ne okazas foje trompoj, atakoj, krimoj, ŝteloj.... Mi tre malofte aŭdis pri tiaj negativaj eventoj.

Ni estas granda familio, kie la fido plej gravas.

## El la landoj kaj sekcioj...

### Bulgario

#### Esperanto – Renkontiĝo en Plovdiv

En la nordbulgara urbo Vraca ĉi-jare denove okazis la tradiciaj festotagoj, dediĉitaj al nia fama poeto-revoluciulo Hristo Botev. Li pereis juna, gvidante bulgaran grupon de Rumanio kun la celo helpi por la liberigo de nia lando, kiu tiam estis sub Otomana potenco. La grupo veturis per la ŝipo „Radecki” tra Danubo al Bulgario. Tamen kaj la Gvidanto kaj la plimulto de la entuziasmuloj estis mortigitaj. Hristo Botev vivis mallonge, sed lasis riĉan verkaron. Liaj poemoj estas nun voĉlegataj dum la deklamkonkursoj en Vraca. Esperantistoj el la lando povis prezenti sin virtuale per liaj verkoj, tradukitaj en Esperanton. Iuj el la plovdivaj partoprenantoj estis premiitaj de la Urba Komunumo de Vraca. Ili ricevis bele aspektantajn Atestilojn.

Ni fieras pri nia plej juna 9-jara deklamanto, Petro Tenev, subtenata de sia patrino Dimitrina. Ne por la unua fojo li tiel partoprenis niajn Esperanto-aranĝojn. Kompreneble estas malfacile trejni kaj memori longajn tekstojn ne en la gepatra, sed en alia lingvo. Li vere indus ricevi aldone krom la Atestilo ankaŭ etan lernejan dorsosakon, sur kiu estas videbla la energi-radianta vizaĝo de Hristo Botev. Por festi la sukcesojn iuj membroj de nia grupo renkontiĝis dimanĉe en la ekstera parto de la dolĉaĵejo „Nedelja” (Dimanĉo).



*Eva-Parashkeva BOYADZHIEVA*

## Esperanto-Sumoo en lingvolernado

*de Krystyna GROCHOCKA (Pollando)*

En la studjaro 2019/2020 mi partoprenis la Instruistan Trejnadon ĉe Universitato de Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), organizatan de ILEI kaj edukado.net kadre de la Interlingvistikaj Studoj de prof. Ilona Koutny. Mi verkis la finlaboraĵon titolitan „*Esperanto-Sumoo en lingvolernado*”. Ĝia celo estis montri kiel la Esperanto-Sumoo helpas en la alproprigo de la lingvo Esperanto.

Por pruvi, ke la Esperanto-Sumoo plibonigas la lingvoscion de legantoj mi preparis enketon kaj dissendis ĝin rete al 80 hazarde elektitaj retadresoj de sumoistoj. Dum tri tagoj mi ricevis 74 plenigitajn enketilojn. La enketatoj respondis al 14 diversaj demandoj.

Preskaŭ ĉiuj enketitoj respondis, ke la Esperanto-Sumoo plibonigas iliajn legokapablojn, komprenkapablojn, skribkapablojn kaj parolkapablojn - tiuj estas la plej gravaj konoj, kiujn ni devas evoluigi dum la lingvolernado. Ĉiuj kvar kapabloj sukcese disvolviĝas dum la partopreno en la Esperanto-Sumoo.

La enketitoj respondis, ke danke al Esperanto-Sumoo pliboniĝis ankaŭ ilia kono de Esperanta literaturo. Post la analizo de la enketrezultoj mi rimarkis, ke luktistoj preferas beletron, ili legas novelojn, romanojn, poeziaĵojn ktp. Multaj sumoistoj legas librojn same tradukitajn kiel ankaŭ originale verkitajn en Esperanto.

Mi konstatis, ke en la unuaj Esperanto-Sumooj luktistoj legis pli multajn paĝojn ol aktuale. La legokonkurso nun multe disvastiĝis, kaj partoprenas en ĝi ne nur lertaj esperantistoj sed ankaŭ komencantoj. Ĉi tio montras, ke Esperanto-Sumoo estas por ĉiuj.

La vera trezoro por popularigi Esperantan literaturon estas recenzoj skribitaj de luktistoj pri legitaj libroj. La recenzoj aperas ekde septembro 2013 kaj estas disponigitaj al ĉiuj en la retejo [www.esperanto-sumoo.pl](http://www.esperanto-sumoo.pl). Dum la jaroj legantoj skribas pli kaj pli da recenzoj.

La verkado de recenzoj estas ankaŭ bona lingva ekzerco, ĝi plibonigas la skribokapablon kaj riĉigas la vortprovizon. La recenzoj estas diversaj, unuj tre interesaj, aliaj malpli, ilia kvalito dependas de la lingvokapabloj de la aŭtoro. Malgraŭ ĉio, danke al recenzoj eblas ion eksci pri libroj kaj elekti la ĝustajn por legi.

Komence la partoprenantoj de la konkurso legas librojn kuŝantajn sur iliaj bretoj, sed kiam ili finas legi tiujn librojn ili aĉetas aŭ prunteprenas novajn. Tiel legantoj ekkonas novajn verkojn kaj verkistojn.

Hori Jasuo (iniciatinto de E-Sumoo) diris: „*Mi estas verkisto. Mi verkas kaj eldonas, sed se esperantistoj ne legas miajn librojn, mia verkista laboro estas tute senutila. Mi estas certa, ke ankaŭ aliaj verkistoj ĝojas pro la Sumoo.*”

Do eblas diri, ke la Esperanto-Sumoo influas la evoluigon de la Esperanta literaturo, ĉar ĝi motivas verkistojn al verkado. La celo de mia laboraĵo estis montri, ke la Esperanto-Sumoo ludas rolon en la lernado de Esperanto, kaj ke ĝi estas unu el la lerniloj taŭgaj en la lingvolernado.

Antaŭ ol verki mian finlaboraĵon, kiel sumoistino, mi mem rimarkis pliboniĝon de mia lingvokono, tial mi volis pruvi, ke tio estas vero.

Mi opinias, ke la partopreno en la legokonkurso havas grandan influon sur la lingvokono. Ĝi pliriĉigas la vortprovizon, fiksas gramatikajn konojn, faciligas lingvokomprenon kaj profundigas la scion pri Esperanta literaturo.

## **Akra disputo pri la angla kiel ĉefa lernobjekto en Ĉinio**

*de Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio)*

Ekde kiam Ĉinio komencis reformadon kaj malfermiĝon en la 1980-aj jaroj, oni enkondukis la anglan lingvon kiel devigan lernobjekton en ĉiujn elementajn kaj mez-nivelajn lernejojn, ĉar la registaro kaj la popoloj opiniis, ke la angla estas grava instrumento por komunikiĝi kun la mondo kaj modernigi Ĉinion. La angla, same kiel la ĉina kaj matematiko, estas decidita kiel ĉefa lernobjekto. Ĝia poentaro estas multe pli grava ol tiu de ne-ĉefaj lernobjektoj. Tamen post ĉirkaŭ dudek jaroj da instruado, multaj homoj komencas dubi pri la neceso de la angla lingvo por ordinaraj civitanoj kaj leviĝis la disputo.

En marto de 2020, s-ro Tang Hailong (*vd. dekstre*), la popola delegito de la Tutlanda Popola Kongreso, proponis pliigi la proporcion de la ĉinlingva poentaro en la enirekzamenoj de la elementaj kaj meznivelaj lernejoj por protekti la gepatran lingvon kaj atentigis pri troa elstarigo de la angla lingvo.





Ĉi-jare marte, S-ro Xu Jin (*vd. maldekstre*), komitatano de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, proponis nuligi la anglan kiel ĉefan lernobjekton, kio rekorde pliiĝis la disputon. Lia propono vekis fortajn eĥojn. Multaj alvokis, ke la registaro nuligu la anglan kiel ĉefan lernobjekton. Ĝis hodiaŭ oni daŭre rete disputas pri tio, ke ĉu la angla lingvo vere necesas.

Ankaŭ mi kiel ĉina civitano multfoje kaj mult-kanale esprimis fortan subtenon al lia propono. Kaj baze de lia propono mi substrekis la gravecon, ke la registaro permesu lernantojn mem libere kaj egale elekti ajnan fremdan lingvon kiel lernobjekton. Mia propono akiris laŭdojn kaj subtenojn de amasoj da interesigantoj rete.

Kompreneble mi scias, ke mia propono ne povas efike influi decidon de la registaro, same kiel formiko, kiu ne povas konvinki elefanton moviĝi, tamen tio estas kontribuo de ordinara civitano al la reta disputo kun milionoj da legantoj. En la disputo mi fojfoje menciis Esperanton kun reklama celo.

Nun mi prezentas tri punktojn:

- Unue, argumentojn por nuligi la anglan kiel ĉefan lernobjekton;
- Due la argumentojn por flegi la anglan lingvon; kaj
- Trie la sintenon de la registaro.

### **Argumentoj por nuligi la anglan kiel ĉefan lernobjekton**

La supre menciitaj tutlanda delegito, komitatano kaj iliaj subtenantoj opinias, ke tute ne necesas, ke ĉiuj lernantoj lernu la anglan. La ĉefaj argumentoj estas:

1. La angla okupas tro longan lernotempon de la lernantoj (ĉ. 10 %). Nuntempe ĉ. 40 milionoj da lernantoj en elementaj kaj meznivelaj lernejoj lernas la anglan dum naŭ jaroj. Sed nur malpli ol 10 % el ili povos uzi la anglan en la estonteco. Por eniri en bonan mezlernejon, multaj lernantoj en la sesa lernojarro en elementaj lernejoj jam ekregis 4 000 anglajn vortojn kaj eĉ akiris la 4a-nivelan atestilon pri la angla lingvo, egalvaloran same kiel tiu postulata de universitato. La memora kvanto de la anglaj vortoj superas tiun de la ĉina. Kaj laŭ la postulo de la Ministerio pri Klerigado, lernantoj de la naŭa lernojarro devas regi nur 3500 ĉinajn ideogramojn, nome ĉiujn ofte uzatajn ideogramojn. Tio sufiĉas por plejparto de la ĉinoj por uzi la ĉinan lingvon dum la tuta vivo.



Tamen 90 % el la 40 milionoj da lernantoj en elementaj kaj meznivelaj lernejoj, kiuj studis la anglan dum tiom da jaroj, uzas la anglan lingvon nur kiel ŝlosilon por eniri en universitatojn. Kiel dirite, nur malpli ol 10 % de la lernantoj povos uzi la anglan estontece. Tio signifas, ke 90% de homoj vane investas ĉirkaŭ 10 % de sia tempo, energio kaj mono en junaj aĝoj.

2. En oktobro 2020 la registaro deklaris planojn por pliigi la instruadon de muziko, sporto kaj pentro-arto en ĉiuj elementaj kaj mezaj lernejoj antaŭ la fino de 2022. Samtempe la centra registaro decidis plifortigi la instruadon de la ĉina lingvo. Tio signifas, ke lernantoj devas investi pli da tempo kaj energio por lerni la menciitajn lernobjektojn, kaj ke ili devas malpliigi la lernadon de aliaj lernobjektoj, kiel la angla, matematiko, fiziko, kemio ktp. Oni opinias, ke matematiko kiel bazo de scienco, teknologio kaj inĝenier-arto ne povas esti malfortigita, kaj fiziko, kemio kaj aliaj, kiel jam deciditaj ne-ĉefaj lernobjektoj, estas ne-ŝanĝeblaj. Do, por ne pliigi la ŝarĝojn de lernantoj, oni povas detranĉi nur el la angla, kiun multaj opinias "senutila".

3. Kun la rapida disvolviĝo de AI (Artefarita Intelekt), tradukaj maŝinoj kaj tradukaj programoj jam estas tre maturaj, kaj ili jam povas provizi tradukajn servojn en ĉiuj kampoj por multaj lingvoj, inkluzive la anglan. La kvalito de la aŭtomata traduko povas atingi eĉ la nivelon 6 en la universitatoj.

La kapablo de la aŭtomataj tradukiloj jam superis la celojn de la angla instruado en la naŭa lernojararo en mezlernejoj laŭ la postulo de la Ministerio pri Klerigado. Do tute ne necesas, ke la lernantoj daŭre pasigu multan tempon por lerni la anglan por sufiĉe regi ĝin.

Kompreneble komitatano s-ro Xu Jin ne estas la sola famulo, kiu havas ĉi tiujn vidpunktojn en Ĉinio. Alia persono, s-ro Zheng Qiang, konata kiel juna "kolera" profesoro, iam alvokis eljeti la anglan el la universitata enir-ekzameno. Li publike kaj kolere avertis en sia klaso: „En la pasintaj 20 jaroj, kiom multe da valora tempo de ĉinaj junuloj estas konsumita de la angla? Oni ege troigis la gravecon de la angla en la kreskigado de infanoj. Fakte tiu fenomeno reliefis mankon de memfido de la tuta ĉina nacio...”.

4. Multaj landoj traktas la anglan kiel ne-ĉefan lernobjekton, kial Ĉinio ne faras same? La tutlanda popola delegito s-ro Tang Hailong argumentas: „Francio, Italio, Germanio, Norvegio, Rusio, Israelo, Sud-Koreio ktp, starigis leĝojn aŭ politikojn por protekti siajn gepatrajn lingvojn kaj rezisti la fortan anglan invadon.” Do ankaŭ Ĉinio devas tiel fari. Lia opinio estas tre subtenata de multaj retumantoj.

## Argumentoj por flegi la anglan kiel ĉefan lernobjekton

Samtempe levigis multaj kontraŭaj voĉoj por flegi la anglan kiel ĉefan lernobjekton. Mi listigas ilin sube:

1. Tre malmultaj homoj intencas sin dediĉi al scienca uzo de matematiko estontece. Kial vi ne proponas nuligi ĝin kiel ĉefan lernobjekton? Ankaŭ fizikon kaj kemion multaj homoj ne uzos estontece. Ĉu oni forigu ilin?

*Kontraŭ tiu voĉo, la kontraŭantoj de la angla lingvo argumentas, ke matematiko estas fundamento por lerni multajn fakojn. Kaj la angla lingvo ne havas saman valoron kiel matematiko. Oni proponas, ke la angla estu same valora, simile al fiziko, kemio kaj aliaj ne-ĉefaj lernobjektoj.*

2. Post la malfortigo de la angla lingvo, infanoj de kamparanoj ne plu havos bonajn kondiĉojn bone lerni la anglan, kompare kun la urbanoj, kiuj povus pli facile lerni la anglan. Tio estas nejusta kaj neegaleca por kamparanoj.

*La kontraŭantoj de la angla argumentas, ke dum la angla rolas kiel ĉefa lernobjekto, infanoj de kamparanoj havas pli malbonajn kondiĉojn por lerni la anglan, ĉar la urbaj kondiĉoj por lerni la anglan estas ĉiam multe pli bonaj ol tiuj en kamparo.*

3. La angla estas monda lingvo por lerni plej novajn sciojn.

*Kaj la kontraŭantoj diris, ke ĉiuj novaj aferoj estas facile troveblaj rete ankaŭ en aliaj lingvoj, inkluzive la ĉinan, escepte de la sekretaj aferoj, kiujn oni ne povas ekscii, eĉ se oni bone regas la anglan.*

4. La angla estas monda lingvo por vojaĝi al aliaj landoj.

*La kontraŭantoj diris: "Tiu, kiuj volas elmigri eksterlanden, klopodos lerni la respektivan lingvon. Ne necesas, ke malmultaj homoj trudu lacigan studadon de la lingvo al plej multaj lernantoj." Tio estas nejusta por la plejmultaj.*

5. Multaj evoluintaj landoj uzas la anglan lingvon kiel sian oficialan lingvon. Ili riĉiĝas ĝuste pro uzo de la angla.

*La kontraŭantoj diras, ke kelkaj landoj en Afriko kaj Azio uzas la anglan kiel oficialan lingvon, ĉu ili vere riĉiĝis pro tio?*

6. La Nobel-premiitoj troviĝas ĉefe en okcidentaj landoj, ĉar ili bone regas la anglan lingvon. Ili povas facile akiri la plej novajn sciojn per la angla, kaj ili povas facile prezenti siajn sciencajn atingaĵojn. Kaj ĉar la ĉinaj sciencistoj ne bone regas la anglan, ĝuste pro tio Ĉinio havas tre malmultajn Nobel-premiitojn.

*Kontraŭ tiu argumento mi afiŝis jenan tekston en la reta diskuto: “En Ĉinio vere troviĝas nur du Nobel-premiitoj. Unu estas s-ino Tou Youyou, Nobel-premiita pro sia scienca atingiĝo en esplorado de medikamento. Bedaŭrinde ŝi ne regas la anglan. Kaj alia estas s-ro Mo Yan, literatura Nobel-premiito pro sia romano “Rano”. Li neniam lernis la anglan. Same kiel mi, multaj retumantoj opinias: se ili investus multan tempon kaj energion por regi la anglan lingvon, ili eble ne povus gajni la Nobel-premiojn”. Miaj argumentoj akiris multajn subtenojn.*

Multaj argumentoj, eĉ reciprokaj insultoj aperas en diversaj retaj kanaloj. Oni eĉ insultas la tutlandan popolan delegiton, la komitatanon kaj multajn anglajn kontraŭantojn, kaj aludas, ke ili ŝajne ne havas bonan klarecon, kaj ili estas malsaĝuloj.

### **Kiuj forte flegas la anglan?**

Oni malkaŝis, ke tiuj, kiuj forte kontraŭas ŝanĝi la rolon de la angla, venas ĉefe el tri grupoj:

**La 1-a grupo** estas instruistoj de la angla lingvo en elementaj kaj meznivelaj lernejoj. Laŭ statistiko de la Ministerio pri Klerigado, da ili estis ĉirkaŭ 0,8 milionoj en 2019. Se la angla fariĝos ne-ĉefa lernobjekto, ĉirkaŭ duono el ili devos ŝanĝi siajn laborojn. Tio estas granda defio por ili.

**La 2-a grupo** estas profitantoj de la angla, alivorte homoj el firmaoj pri instruado de la angla lingvo. Nun la merkato pri instruado de la angla fariĝas la plej granda kuko de la instrua merkato en Ĉinio. La plej rapide kreskanta instrua merkato estas instruado de la angla por infanoj.

Laŭ statistiko, en 2019, la ĉina merkato pri instruado de la angla atingis 175,8 miliardojn da juanoj, el kiuj tiu de plenkreskula trejnado estis 95,8 miliardoj da juanoj kaj tiu de infanoj estis 80 miliardoj da juanoj. La nombro de firmaoj pri instruado de la angla superis 50 000 en la lando. La lernantoj instruataj de la firmaoj atingis 23,44 milionojn, kun interjara pliiĝo de 14,6 %. Laŭ raporto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, la merkato por instruado de la angla por gejunuloj en eksterlandeaj firmaoj atingis 125 miliardojn da juanoj en 2020.

Post kiam la angla kiel ĉefa lernobjekto estos nuligita, la merkato pri instruado de la angla tuj disfalos. Ĝuste pro tio la profitantoj de la angla lingvo forte kontraŭas tion. Mi rimarkis, ke iuj retaj afiŝoj kontraŭ instruado de la angla estis forigitaj. Oni imagu, kiuj faris tion.

**La 3-a grupo** estas gepatroj, kies gefiloj bone lernas la anglan. La gepatroj kredas, ke iliaj gefiloj havos bonan estontecon, nur se ili bone regos la anglan, aŭ ili planas sendi siajn gefilojn studi en fremdajn landojn.

## La sinteno de la registaro

Mi ŝatus komenti kelkajn ŝanĝojn en Ĉinio. Ekde 2010, la Ĉina Ministerio de Eksterlandaj Aferoj decidis ne plu uzi la anglan en la Gazetara Konferenco. Fremdlandaj ĵurnalistoj laborantaj en Ĉinio devas pene lerni kaj regi la ĉinan lingvon. Antaŭe, lernantoj rajtis elekti unu el la angla, japana kaj rusa lingvoj en sia universitata enirekzameno. En 2020, la ĉina Ministerio pri Klerigado deklaris, ke lernantoj rajtas elekti ajnan fremdan lingvon, inter ili ankaŭ la germanan, francan aŭ hispanan anstataŭ la anglan. En lastaj jaroj oni rimarkis, ke la Pekina Fremdlingva Universitato komencis akcepti pli da studentoj por studi „malgrandajn” fremdajn lingvojn. Kaj en 2020 la nombro de instruataj fremdaj lingvoj rapide kreskis ĝis ĉirkaŭ 100.

## Resume

Kvankam plejparto de la ĉinaj civitanoj opinias, ke Ĉinio vere bezonas instruadon de la angla en la elementaj kaj meznivelaj lernejoj, oni tamen alvokas, ke la registaro traktu la anglan ne tiom valora, same kiel la ĉinan kaj matematikon, kaj ke la angla, same kiel aliaj fremdaj lingvoj, estu normala sed ne tro trudata fremda lingvo. Tiuj opinioj estas forte kontraŭataj de profitantoj de la angla. La afiŝoj kontraŭ la angla sur retaj kanaloj kelkfoje estas mistere forigitaj. Anstataŭ respondi al la alvokoj de la kontraŭantoj de la angla, la registaro ŝajne komencas moviĝi al pli justa kaj ĝusta direkto.

Mi antaŭvidas, ke kiam la registaro permesos al la lernantoj libere elekti ajnan fremdan lingvon en la universitata enira ekzameno, nova problemo aperos al la Ministerio pri Klerigado: multaj lernantoj preferos elekti la internacian lingvon Esperanto, ĉar ĝi estas ses- ĝis dek-oble pli facila ol la angla por ĉinoj, laŭ la sperto de mi kaj multaj aliaj ĉinaj esperantistoj. La Elementa Lernejo Baiyangshujie en Taiyuan jam enkondukis Esperanton kiel lernejan lernobjekton ekde 2008 kaj instruas ĝin jam 13 jarojn. La instruado de Esperanto havas fortan subtenon de la provinca kleriga instanco. Almenaŭ tri elementaj lernejoj en Ĉinio jam enkondukis Esperanton kiel lernejan lernobjekton. (*Reviziita de Andrej Pechenkin*)

**Trezoro Huang Yinbao**, vicprezidanto de UEA, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto, Ĉinio, iniciatinto kaj eksa ĉefredaktoro de Unesko-Kuriero en Esperanto, iniciatinto kaj ĉefredaktoro de De ideoj al agoj -70 jaroj de Unesko, eldonita de Unesko kun UEA.



## INFORMOJ PRI ILEI

### Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

**Kontrolo:** Simon Smits (*la dua membro elektota*)

**Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

### Enmovadaj partneroj (entute 14)

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net). Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**IFEF** (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la repaĝon de UEA*

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**.

Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido**.

**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,

[www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi**.

Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

*kaj aliaj*

### Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

**ALTE** (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*)

**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

**Unesco** (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@aliceadsl.fr](mailto:monique.arnaud@aliceadsl.fr), **Martine Demouy, Max Demouy, Jesper Jakobsen, Josiane Moirand**

*kaj aliaj*

## Membreco kaj pagado por diversaj servoj

**Membreco kostas 25 € en A-landoj** (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Supera membro estas tiu **ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA)**. Tio kostas por A-landanoj **40 € kaj por B-landanoj 22,50 €**. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

\* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

\* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).


\* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), [www.ilei.info/ipr/](http://www.ilei.info/ipr/); tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): Olena Poshivana, [amatalena@ukr.net](mailto:amatalena@ukr.net). La revuo estas rete aŭskultebla por vid-handikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, [moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com).

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2021,  
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2021.**



*Estraranoj de ILEI dum VEKI-2 (vd. p. 4)*



*La Nacia E-Biblioteko kaj Arkivo de Massa (vd. p. 22)*

# BOLOGNA CHILDREN'S BOOK FAIR

55<sup>th</sup> edition  
Fertile  
for children  
content  
26  
Bo  
It

